

## Pasko en Moravio

Similie kiel en aliaj slavaj landoj ankaŭ en historia ĉeĥa lando Moravio ĝis nun vivas lokaj tradicioj de Pasko-festado. Printempe mi vizitis tiun landon kune kun Markéta. Ĉar vetero en mia lando ne estis ankoraŭ plene [tute] printempa mi bedaŭrinde malvarmumiĝis antaŭ nia forveturo tien. Tamen, post nia alveno, danke al gustumado de saniganta vino de Moravio, promenado tra moravia naturo ĉe freŝa aero kaj varmigado de printempa suno mi baldaŭ saniĝis. Ĉio tio montriĝis [pruvis] esti vera kuracilo!

Moravio estas unu el la plej interesaj regionoj de Ĉeĥio. Granda nombro de vizitindaj lokoj altiras turistojn. Nome kasteloj en interesaj historiaj urboj, vinkeloj, kie oni povas gustumi lokan vinon, montetoj, kavernoj, naturrezervejoj, ripozlokoj ĉe la akvo, kuracbanlokoj, biciklvojetoj kaj turismaj itineroj. Tiu regiono etendiĝas [situas] en orienta parto de Ĉeĥio kaj najbaras okcidente Bohemion, sude federacian landon Malsupra Aŭstrio, sudoriente kaj oriente Slovakion, nordoriente Ĉeĥan Silezion kaj norde Polan Malsupran Silezion. Kiel metropolo de Moravio estas konsiderata Brno ekde la jaro 1641. Antaŭe ĉefurbo estis Olomouc, kiu eĉ plu apartenas al signifaj historiaj urboj de Moravio.

Dum Pasko ni vizitis t.n. Ĝardenon de Eŭropo, t.e. Areon de Lednice - Valtice, kiu apartenas al la plej belaj teritorioj de la kontinento kaj najbaran natur-protektatan pejzaĝ-parkon Pálava ĉe rivero Dyje, en la plej varma parto de Ĉeĥio. Ties valoro konsistas en harmonia kunesto de libera naturo kun multaj fiŝlagoj, kultivita pejzaĝo, parkoj kaj interesaj arkitekturaĵoj, inter kiuj precipe elstaras kasteloj en la du proksimaj urbetoj.

Fondintoj kaj dum multaj jarcentoj posedintoj de ĉiuj tiuj homfaritaj belaĵoj estis gento Liechtenstein, sed ekde la jaro 1945 la tuta havaĵaro apartenas al la ŝtato de Ĉeĥa Respubliko. Por la eksterordinara multflanka signifo jenan vastan areon ŝirmas de la jaro 1996 UNESCO, enskribinte ĝin en la tutmondan liston de kultura heredaĵo de la homaro. Najbara naturparko de Pálava jam en la 1986 jaro fariĝis biosfera rezervejo de UNESCO nomata „Malsupra Moravio”.

Je kristana Sankta Sabato ni venis tra Břeclav al Valtice, kie ni renkontis bele popol-vestitajn lokajn homojn. Enmane ili tenis korbojn kun jena enhavo: bele kolorigitaj kuiritaj ovoj (t.n. *velikonoční kraslice*) kaj aliaj manĝproduktoj akompanataj de printempaj plantoj. De frua kristaneco la ovoj oni konsideras simbolo de fekundeco kaj renaskiĝo (alivorte nova vivo). La lokaj homoj iris al preĝejo por sanktigi tiujn manĝproduktojn antaŭ solena matenmanĝo. Ĉe tablo ni vidis kukon bakitan en formo de sidanta ŝafo (t.n. *velikonoční beránek*), kiu laŭ Biblio simbolas rezurektitan Kriston. Arbustoj apud enirejo al domoj dum Pasko estis bele dekoritaj de pendantaj, bele kolorigitaj, blovitaj ovoj kaj multkoloraj rubandoj. Dimanĉe dum solena sankta meso en alia urbeto de Moravio ni denove renkontis lokajn homojn, kiuj portis belajn popolajn vestaĵojn.

Krom partopreno en religia festado de Pasko ni estis ankaŭ atestantoj de popolaj kutimoj, kiuj rilatas al printempo. Lunde viroj delikate batis inojn per vipo (t.n. *pomlázka*) memfarita el freŝaj molaj ŝosoj de saliko kaj dekorita je ĝia fino de koloraj rubandoj. Laŭ popola kredo tio provizas sanon kaj fekundecon por batitaj knabinoj. Dum vipado viroj recitis aŭ kantis popolajn kantojn (t.n. *koledy*). La vorto *pomlázka* probable originis de vorto *pomládít*, kiu signifas *farigi pli juna*. Vipante knabinojn oni simbole transdonas freŝecon kaj elastecon [flekseblon], forton kaj sanon de la juna printempa vergo. Similan signifon havas la referenco al la vorto *mlází*: densejo de freŝe verdaj, t.e. junaj, ŝosoj de plantoj. Paska vipado estas perceptita kiel pozitiva kaj vipitaj inoj dankas pro tio al viroj (parole kaj simbole - donacante ovojn). Kontraŭe, nevipitaj virinoj maltrankviliĝas pro tio. Interese estas, ke kiam alproksimiĝas la festoj,

en Ĉeĥio oni bondeziras *Ĝojplenan Paskon kaj abundan vipadon!* (ĉeĥe *Veselé Velikonoce a bohatou pomlázku!*). En Pollando viroj samcele verŝas tiam akvon sur inoj, iam ankaŭ batis ilin per branĉetoj de saliko (kutimo konata kiel *śmigus-dyngus*).

Ege plaĉis al mi vizito al Lednice kaj sekve al Areo de Protektata Pejzaĝo "Pálava" - biosfera rezevejo de UNESCO "Malsupra Moravio", kie abundas bela naturo, ĉe lagetoj vivas multaj birdoj kaj aliaj bestoj, troviĝas multaj rokoj, kastelo kaj eksterordinaraj konstruaĵoj ekzemple minareto. Ni vidis tie prezentadon de trejnitaj rabobirdoj, ĉefe falkoj kaj strigoj, kaj popolan folkoran festivalon de adiaŭo de vintro kaj bonvenigo de printempo t.n. *dronigadon de Morana*, kiu laŭ slava mitologio estis diino – simbolo de vintro kaj morto.

En Valtice ni vizitis kastelon konstruitan de nobla familio Lichtenstein, danke al kiuj tuta regiono vaste disvolviĝis. Ili estas unu al plej malnovaj kaj riĉaj aŭstria noblaj domoj, kies kapo nuntempe estas reganta en la Princlando de Liĥtenŝtejno. Kontribuo de la Lichtenstein-nobeluloj al tiu regiono estas konata ekde la tempo de mezepoka kavaliro kaj amkantiso Oldřich (1200 - 1275), kies frato Jindřich partoprenis multajn kampanjojn de ĉeĥa reganto Přemysl Otokar II, rekompence ricevis kastelon de Mikulov kaj fariĝis fondinto de la Moravia branĉo de sia nobla domo.

Ĉe enirejo al la kastelo kaj en preĝejo mi ekvidis blazonon de Lichtenstein - kun aglo kaj ĉasista korno - ĉe kies malsupro sur ĉeno pendas ŝafido – karakteriza simbolo de la kavalira Ordeno de Ŝaffelo. La samam ŝafidon sur ĉeno sed pendantan ĉe brusto de arĝentigita ligna aglo kun malfemitaĵ flugiloj antaŭe mi vidis ene de preĝejo de sankta Maria sur ĈefPlaco de Krakovo (ĉe la skulptita birdo dekorita de la ordeno donacita en la 1601a jaro de la hispana monarko Filipo la 3-a al la monarko Sigismondo la 3-a Vasa).

Sur multaj kampoj de Moravio oni kultivas vitojn. Tio eblas danke al dekliva kaj sunriĉa tereno kun taŭga grundo por plantado de vitoj. Ekzistas tie jam longa tradicio de vinkultivado. Vitoj alportis tien la romiaj legioj de Marko Aurelio kaj post la alveno de la slavoj vinberejoj en tiuj areoj estis jam permanenta pejzaĝo-traĵto (elemento). Postan disvastiĝon de vinkultivado oni meritas al familioj de Seefeld kaj Lichtenstein.

Valtice, konata kiel "ĉefurbo de vino", estas centro de edukado pri vinfarado. Ekde 1873 funkcias tie Mezlernejo pri vinfarado, plej malnova ne nur en Ĉeĥa Respubliko sed ankaŭ en Malsupra Aŭstrio, kie Valtice apartenis ĝis 1920 jaro. En la urbo funkcias Nacia centro de vinoj, Salono de vinoj de Ĉeĥa Respubliko, Akademio de vino "Valtice", kiu trejnas somelierojn (vinistojn) kaj vinofakulojn, kaj troviĝas tie ankaŭ eduka itinero de vino kun 19 tabuloj en tri lingvoj kaj bildoj, kiuj prezentas informon pri vinkultivado, historio de vinfarado kaj pri aliaj vizitindaj historiaj lokoj. Vinfoiroj de Valtice estas la plej granda vinekspozicio en Centra Eŭropo. La plej bonajn vinojn de Moravio kaj Bohemio oni povas gustumi en la ekspozicio de la Salono de Vino de Ĉeĥa Respubliko en la kastelo de Valtice. Por vino-amantoj atendas tie 100 la plej bonaj por la nuna sezono, zorge elektitaj, vinoj de la Respubliko. Kun granda plezuro (kaj saniganta efiko por mi) ni gustumis kelkajn glasetojn de lokaj vinoj i.a. *Frankovka, Tramín červený, Sylvánské zelené, Ryzlink rýnský* kaj *Svatovavřínecké* de vinfarejo *Château Valtice*, akompane de loka manĝo en vinkelo kun longaj koridoroj. Ĉeokaze de Pasko oni preparis specialan eventon: *Vagado tra la ĉefurbo de vino* dum kiu oni povis viziti 17 vinkelojn. Vespere okazis koncertoj. Popolvestitaj muzikistoj ludis diversajn muzikajn instrumentojn: cimbalon, violonojn, klarneton, violonĉelon kaj kantistoj en la vinkelo kaj ĉe korto de la kastelo.

Laborinte antaŭ kelkaj jaroj en Brno, ĉefurbo de Moravio, frue aŭtune mi ĝuis gustumadon de freŝa *nova vino* t.n. *burčák*, kiu estas ankoraŭ ne preta vino, sed el blankaj aŭ ruĝaj vinberoj presita vinbersuko, kies alkohola fermentado ĵus komenciĝis. La ankoraŭ nefiltrita vino ne estas klara kaj aspektas laktoblanke, tial foje nomita „plumblanka vino“. Vinbersuko komenciĝas rapide fermenti pro la naturaj kaj aldonitaj gistoj. Dum la fermentado la sukero (glukozo kaj fruktozo) el la beroj transformiĝas en alkoholo kaj karbonacido. Ĝi plufermentiĝas ĝis la plej granda parto de la sukero estas transformigita al alkoholo. Laŭ la tradicio oni manĝas cepan kukon trinkante *la novan vinon*. Por ekscii plu pri tiu alkoholaĵo mi proponas spekti amuzan ĉeĥan komedion filmitan en Moravio, kiu havas polan titolon “*Juna vino*” (origine titolitan en ĉeĥa lingvo “*Bobule*” t.e. vinberoj) reĝisoritan de Tomáš Bařina kaj tradukitan al pola kaj aliaj lingvoj.

Vojaĝante tra Ĉeĥio nenie mi povis aĉeti *varmigitan spicvinon* (t.e. ruĝan vinon kun spicaĵoj: sanigantaj kariofiloj, cinamo kaj citrusoŝeloj), kiu estas tiom multe populara en Pollando. Tamen, en Mikulov [tio] estis alie. Ĉe unu budo sur la Ĉefplaco mi ekvidis ŝildon “*Svařené víno*”. Verŝajne danke al proksimeco de pola landlimo tiu tipo de vino fariĝis konata ankaŭ en la ĉeĥa urbo de Moravio fama pro vinkultivado.

Dimanĉe ni vizitis belan kastelon en Lednice, ĉe kiu ni renkontis homojn bele vestitajn laŭ historia maniero kiel nobeluloj i.a. inoj kun krinolinoj. Sur la loko de la grandioza konstruaĵo jam ĉirkaŭ 1220 estis gotika fortikaĵo kun korto. Fabele romantika kastelo en la Tudorstilo de angla gotiko estas rezulto de la lasta rekonstruo sub la komando de la viena arkitekto Jiří Wingelmüller. Antaŭ li ĝi estis ŝanĝata laŭ imagoj (ideoj) de la arkitektoj Giovanni Giacomo Tencalla, Johann Bernhardt Fischer von Erlach kaj Domenico Martinelli. Bela arkitekturo de la alloga palaco altiras atenton de vizitantoj. Riĉe ĉizitaj muroj, kasonaj plafonoj, etaĝoj inkrustitaj per diversaj tipoj de ligno kaj aliaj detaloj en la reprezentaj ĉambroj [salonoj] en la teretaĝo estas pruvo de la plej fajna manfaritaĵo kaj perfekta gusto de princa familio. Ĉi-tiuj salonoj estas konataj en la mondo ĉefe pro la helika ŝtuparo en la kastela biblioteko, kiu estis skulptita de ĉarpentisto el unu trunko dum ok jaroj.

Promenante tra apuda parko ni trovis ĉirkaŭ dudek de malgrandaj romantikaj aŭ klasikismaj konstruaĵoj (ĉeĥe *salety*), vidindaĵoj establitaj laŭ la principoj de la angla pejzaĝigado, kiuj ornamas la parkon kaj ofte rilatas al historio, aliaj kulturoj aŭ antikvaj tempoj. Ili situas ĉe semi-rondo ĉirkaŭ la kastelo en Lednice kaj kelkaj pli proksime al Valtice. La unue konstruita estis havanta 302-ŝtupojn 60-metroj-alta *minareto*, konstruita dum la jaroj 1797–1802 en maŭra stilo, el kies pinto videblas eĉ malantaŭ la landlimo. Kapitano de ŝipo per kiu ni poste veturis tra apudaj akvokanaloj, diris, ke la minareto [kiun ni preterpasis,] estis konstruita kiel protesto. La princo Josef Aloise I von Lichtenstein, kiu loĝis tie, planis konstrui kristanan preĝejon en la loko de la malnova urbodomo, kiun oni planis malkonstrui. Li planis plene financi konstruadon de la preĝejo sed postulis, ke la urbaj konsilistoj [magistratanoj] almenaŭ senpage disponigu teron por la preĝejo. Ili ne volis interkonsenti kun li, pensante, ke se la princo havas sufiĉe multe da mono por konstrui preĝejon, do li povas ankaŭ aĉeti de ili teron [de la malnova urbodomo]. Estante kristano sed vidante kiel avidaj estis [vidante avarecon de] la urbaj konsilistoj, la princo decidis, ke ili meritas nur musliman preĝdomon kaj anstataŭe li konstruis sur sia tero la minareton. Poste oni konstruis ankoraŭ multajn aliajn eksterordinarajn objektojn devenantajn el aliaj kulturoj kaj tempoj sur la la princa tero.

Proksime al la minareto troviĝas ŝtona egipta obelisko konstruita omaĝe al pacinterkonsento kun Napoleono en *Campo Formio*, *Maŭra akvoprovizdomo* ĉe digo de la rivero *Dyje* (aŭstre *Thaya*), kiu iam provizis akvon al fontanoj en la parko, *Roma Akvedukto*, *Templo de Apolono*, *Templo de Diana* (t.n.

*Rendezvous - Renkonto*), romantika ruino de kavalira fortikaĵo *Burgo de Jan*, *Templo de Tri Gracioj* (t.e. diinoj laŭ greka mitologio, kiuj prezidis la bankedojn, la dancon, kaj ĉiujn sociajn ĝuojn, kaj elegantajn artojn), triflanka *Kapelo de sankta Huberto*, meze de kiu, kiel en la okulo de Dio, li staras kun sia fidela hundo, en la loko, kie iam komencadis ĉasado finanta ĉe klasikisma konstruaĵo de *Ĉasista Kasteleto*. Aliaj belaj [ĉarmaj] konstruaĵoj situantaj tiej estas jenaj: *Laĝeta Kasteleto*, *Belveder-kasteleto* kaj *Galerio "Kolonáda na Reistně"* sur kresto de monteto nomata Reistna, el kiu eblas vidi en ĉiuj monddirektoj: la nordo estas ĉirkaŭita de vinberejoj de Valtice kaj parko de Lednice, en la sudo videblas aŭstra Schattenberg, orientan horizonton ornamas la Malgrandaj Karpatoj kaj en la okcidento videblas silueto de Mikulov.

Multaj el tiuj konstruaĵoj estas verkoj de aŭstro Josefo Hardtmuth, filo de ĉarpenisto kaj edukita masonisto, kiu danke al sia talento fariĝis princa ĉefarkitekto. Krom la konstruaĵoj li famiĝis pro multaj inventiloj. Li desegnis por la bieno novan tipon de arbaro, inventis ceramikajn potojn kaj aliajn ŝtonajn ujojn, senplumban glazuron por apoteko [t.e. senigitan de kemia elemento plumbo], novan tipon de plenigaĵo por kraĵono faritan el grafito kaj argilo, kiu estis pli durabla, ne pinĉis kiel pura grafito kaj estis akceptita de klientoj kun neatendite granda sukceso, nigran kreton, artefaritan pumikon; krom tio li produktis famajn fornojn kaj fondis uzinon produktantan novajn skribilojn, kiuj estis sukcese vendataj en tuta Eŭropo kaj establis la komercan signon [markon] *Hardtmuth Koh-i-noor* (kies nomo estis pruntedonita de unu el la plej grandaj diamantoj en la mondo, multon vojaĝinta ofte ŝanĝante siajn posedintojn kaj post tranĉado kaj polurado instalita en la brita krono) kaj kiu ĝis nun funkcias en České Budějovice.

Je fino de nia vojaĝo ni venis al urbeto Mikulov, formita laŭ itala renesanca stilo, kie troviĝas kastelo - malnova sidejo de nobeluloj. Ĝia historio komencas en 13a jarcento kiam oni konstruis kastelon de la teritoria reganto, kiu en la jaro 1249 pasis en la manoj de gento Lichteinstein. Origine gotika kastelo poste ekhavis renesancan kaj barokan formon dum la periodo ekde 1575, kiam la posedanto de Mikulov iĝis gento de Dietrichstein. Mikulov estas unu el vinkulturaj centroj de suda Moravio. Atesto de vinkultura tradicio estas vinbarelo kun enhavo 1 010 hl en kelo de la kastelo en Mikulov. Ĉiujare en la urbo okazas Vinberrikolto de Pálava.

En la urbo vizitindas la kastelo, Dietrichstein-tombo, historia placo, vinkeloj, la kristanaj preĝejoj de sankta Václav, sankta Johano Bapitsto, sankta Nikolao kaj la judaj sinagogo, banejo "Mikveo" servanta je rita purigo, tombejo kaj ceremonia halo. La komenco de la juda setlejo en Mikulov (germanlingve Nikolsburg) datiĝas ĝis 1421, kiam judoj estis forpelitaj de Vieno kaj de la apuda provinco de Malsupra Aŭstrio. La rifuĝintoj ekloĝis en la urbeto, kiu situas proksime al la aŭstra limo, sub la protekto de la princoj de Liĥtenŝtejno.

Unu el plej vizitindaj en Mikulov estas *Svatý Kopeček* (t.e. Sankta Monteto) - historia loko, kie agadis predikistoj: sanktaj Cirilo (alinome Konstanteno) kaj Metodo. Ili estis denaskaj fratoj, tre edukitaj, devenantaj el greka urbo Tesaloniko, la ĉefurbo de Makedonio, kiuj proklamis la vorton de Dio kaj disvastigis la kulturon. Danke al ili aperis slava skribmaniero nomata *Kirilico*. Verkon „*Proglas – Antaŭkanto al Evangelio*” de Konstanteno la Filozofo oni eldonis en 8 lingvoj (inkl. pola) ĉeokaze de 101a UK okazinta en 2016j. en slovakaj urbo Nitra, kie ili ankaŭ laboris. Esperantan tradukon de la verko faris Mária Pilková, kontrolis ĝin Miroslav Malovec kaj ĝi aperis danke al eldonejo ESPERO de Péter Balázs. Sur la Sankta Monteto troviĝas kelkaj blankaj kapeloj i.a. de sankta Sebastiano, origine konstruita de

František el Deichtrichtein (1570 -1636) kiel danko al Dio pro supero de la pesto-epidemia kaj kreskas tie naturprotektataj plantoj. De longa tempo al tiu la surmonteta historia loko okazas tradicia pilgrimado.

La antaŭulo de la hodiaŭa ŝtata liceo en Mikulov estis fondita en 1631 jaro la piarista lernejo [t.e. prizorgita fare de katolika ordeno de Piaristoj "Ordo Clericorum Regularium Pauperum Matris Dei Scholarum Piarum", kies membroj laboras precipe en klerigado kaj en lernejojn por malriĉuloj]. Inter la studentoj estis Jan Evangelista Purkyně (1787-1869), kiu poste ankaŭ instruis tie. Li estis ĉeĥa natursciencisto, kuracisto kaj fiziologo, kunfondinto de eksperimenta fiziologio, kiu kontribuis al formulado de teorio pri ĉeloj. Kelkaj malkovroj estis nomitaj laŭ li: ĉeloj de Purkinjo, filamentoj de Purkinjo kaj efiko de Purkinjo: dum krepusko la homa okulo perceptas la bluan koloron pli bone ol la ruĝan, tial ĉe tagiĝo la bluaj objektoj aperas kiel la unuaj kaj ĉe vesperiĝo malaperas kiel la lastaj; kontraste dum taglumo ruĝaj objektoj estas plej bone videblaj. Laŭ iuj studoj posedanto de ruĝa auto profitas (veturante dum tago) ĉar aliaj ŝoforistoj unue ekvidas ĝian aŭton sur ŝoseo kaj ofte donas al ĝi prioritaton sur vojo.

Ĉe unu trankvila placo en Mikulov, en najbareco de vinkeloj, mi ekvidis statuon de kuŝanta (verŝajne ebriligita) Dionizo, ankaŭ konata per la nomo Bakĥo, kiu laŭ la Helena mitologio estis dio de vino.

Apud la urbo vizitindas Kozí hrádek – observturo de iama kasteleto kaj natura rezervejo Turoid – Bradlo kun la kaverna sistemo kaj en proksima Pálava - restaĵoj de Siroťčí hrádek ĉe montetoj de Pavlov.

La pleja alteco de Pálava estas Děvín - 549 msm. De la deklivoj, tra kiuj kondukas la pado [la itinero] ĉe alteco de pli ol 500 metroj, videblas bela ĉirkaŭaĵo i.a. al apuda lago. Dum bona vetero oni povas vidi urbon Brno (40 km), la pinton de la Granda Jaworzyna en la Blankaj Karpatoj (90 km) aŭ la potencan nuklean [atomkernan] centralon en Dukovany (40 km).

Unu el la verticoj de Děvín, situanta en la norda parto de la monteto, fronte al la lageto, estis uzita ekde jarcentoj por defendaj celoj, kion pruvas la restaĵoj de mezepoka kastelo Dívčí hrad (alinome Děvičky). La kastelo estis menciita je la unua fojo en 1222 jaro kaj ĝi restis en la posedo de subsekvaj ĉeĥaj kaj aŭstraj teritoriaj regantoj kiel ligna fortikaĵo gardanta la gravan vojon el Vieno al la nordo: Moravio kaj Silesio.

Plaĉis al mi ĉeĥa senso de humuro. Ekzemple *"Vinařská pohotovost"* ĉe vinkelo en Valtice t.e. *"Ambulanco de vino"*, kiun oni povas viziti je iu ajn horo dum kriza situacio ☺ *"Pumpstacio en operacio. Ni provizas kafon, vinon kaj aliajn brulaĵojn sen kiuj vi mortos en la mezo de vojo al la monteto Kozák"* – bonveniga surskribo ĉe vinkelo *cafeBarta*. Survoje al kasteleto *Kozí hrádek* apud Mikulov ĉe unu domo oni anoncis jenan oferton akompane de foto de Charlie Chaplin: *"Ĉi-tie eblas lasi - kontraŭ modesta monata kotizo - nekontentigantan edzinon aŭ bopatrinnon. Plia informo ĉe posedanto de la propraĵo"* ☺ Estus interese scii kiom multe da vizitintoj profitis je tiuj ofertoj [utiligis tiujn ofertojn].

Ni renkontis multajn biciklistojn, kiuj kun plezuro veturis tra la regiono al vizitindaj lokoj kaj kelkaj partoprenis biciklan konkurson tie.

Resumante Moravio estas tre vizitinda lando. Precipe kasteloj en Lednice, Valtice kaj Mikulov, naturaj lokoj ekzemple en Pálava kaj antaŭ ĉio vinkeloj, kie oni povas gustumi bonajn lokajn vinojn. Aliaj vizitindaj lokoj en tiu regiono estas historiaj urboj Olomouc kaj Brno, kie funkcias E-klubo; krom tio grotoj kaj kavernoj de Moravia karsto (ĉeĥe *Moravský Kras*).

Verkis: Adam Wilkus

Pluaj informoj pri vizititaj lokoj legeblas ĉe jenaj retpaĝoj:

Kasteloj en Valtice, Lednice kaj Mikulov:

[http://moravianjourney.com/wp-content/uploads/2015/06/zamek\\_lednice.jpg](http://moravianjourney.com/wp-content/uploads/2015/06/zamek_lednice.jpg)

<https://www.zamek-valtice.cz/>

<https://www.zamek-lednice.cz>

Ŝtuparo en la kastela biblioteko (panorama foto):

<http://www.panoramaticke-fotografie.cz/data/pano2/pano03/pano03.html>

<http://www.mikulov.cz/turistika/pamatky-a-prohlidkove-objekty/zamek/>

Regiona Muzeo en Mikulov:

<http://www.rmm.cz/>

Itinero de vino:

<http://www.vinarskastezka.cz/>

<http://vinarska-akademie.cz/>

UNESCO Naturrezervejo de biosfero Palava (pluraj linvoj)

<http://www.czechtourism.com/pl/c/palava-biosphere-reserve/>

Ekskursoj tra Moravio (nur pollingve)

<http://morawy.wycieczkowo.info/>

Moravio:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Moravio>

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Lednice-Valtice>

[https://pl.wikipedia.org/wiki/Obszar\\_Chronionego\\_Krajobrazu\\_Palava](https://pl.wikipedia.org/wiki/Obszar_Chronionego_Krajobrazu_Palava)

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Nova\\_vino](https://eo.wikipedia.org/wiki/Nova_vino)

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Dyje\\_\(rivero\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Dyje_(rivero))